
**Homo kontraŭ ĉevalo**

Kiu fine venkis? Homo aŭ ĉevalo? Iu biereja diskuto, certe iom alkoholeca, en la kimra *Llanwirtyd Wells* survojigis la konkuradon. Kiu nun estas pli rapida, homo aŭ ĉevalo? La enloĝanto *Gordon Green* ne plu povis kaj volis elteni la sensencan senfinan babilaĉadon kaj organizis realan verifan teston.



Oni determinis distancon de 22 mejloj (t.e. 35 kilometroj) kaj fiksis la sumon da 1000 britaj pundoj por tiu kuranto, kiu antaŭ ĉiuj startintaj ĉevalrajdantoj trairos la cellinion. La sumo tamen longan tempon tute ne estis pagenda.

Jaron post jaro oni nun okazigis la vetkuradon kaj jaron post jaro la sumo por la venkonta kuranto plialtiĝis laŭ 1000 pundoj. En la 25-a vetkurado, la 12-an de junio 2004, venkis *Huw Lobb* el Londono en 2:05:19 horoj antaŭ 500 kurantoj kaj 40 ĉevaloj – kaj enkasigis 25 000 britajn pundojn. Ho, se li estus atendinta kelkajn pluajn jarojn… (2010-06-12/13)

**Funga lev-kapacito**

La ĉeloj de fungoj reagas al la tera gravito kaj sin tenas ekzakte vertikalaj en sia kreskado. Flankenpuŝita fungo rapide rektiĝas kaj vertikale plukreskas. La kanada fungoesploristo *Reginald Buller* (1874-1944) estis la unua sciencisto, kiu esploris la lev-kapacitan povecon de fungoj. Li metis pezilojn sur fungojn kreskantajn en vitrotuboj kaj eltrovis, ke ekz. *Coprinus sterquilinus*, la grandspora fekofungo kun nur 5-milimetra trunk-dikeco evoluigas supren direktitan potencon de preskaŭ 250 gramoj.

Levi kaj penetri stratan asfalt-kovraĵon estas tutleĝera praktiko por la fortikuloj inter la fungoj, la koprofungoj. En Britujo oni malkovris grandan *Coprinus comatus*, kiu levis ŝtonan slabon 60 x 75 centimetrojn grandan en daŭro de 2 tagoj 4 centimetrojn super la ĉirkaŭa pavim-nivelo. Bonvolu pensi pri tio, kiam vi sekvafoje etendas vian lacan korpon sur arbara grundo. (2010-09-01)

–☼–☼–☼–


# Scienca Revuo Vol. 62 (2011) (1) / n-ro 224

**Oficiala organo de Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE)**
**Hejmpaĝo: http://www.eventoj.hu/isae/**

Pres-indikaĵoj: ISSN 0048-9557.
Eldonanto: ISAE Eldonkvanto: 200 ekzempleroj
Laserkopiita: jan/feb/mar 2011 ĉe *Copy & Co, Marktplatz 30 DE - 37269 Eschwege* / Germanio
Redakcia komisiono: La estraro de ISAE kaj la du honoraj membroj

Membrokotizo de ISAE : € 20,00/jare
pagebla pere de via
a) landa peranto (aŭ landa delegito)
aŭ rekte al la
b) ISAE-konto **isae-z** ĉe UEA/*Rotterdam* (NL), sed nepre informu pri via membrokotizpago laŭ la suba adreso.



**Landaj Perantoj de ISAE**

| | | |
|---|---|---|
| Aŭstralio | *Libroservo AEA* <br> *143, Lawson St., Redfern, AU 2016 N.S.W.* | *<libroservo@esperanto.org.au>* |
| Brazilo | *Brazila Esperanto-Ligo (BEL)* <br> *C.P. 03625 BEL, BR 70084-970 Brasília* | *<bel@esperanto.org.br>* |
| Britio | *S-ino Viv O'Dunne* <br> *p.a. Esperanto Asocio de Britio (EAB)* <br> *Station Rd., Barlaston* <br> *Stoke-on-Trent, Staffordshire, ST12 9DE Britio* | *<eab@esperanto-gb.org>* |
| Finnlando | *S-ino Päivi Saarinen* <br> *Ruorimielenkatu 5 C 23, FI-02320 Espoo* | *<paivi.saarinen@iki.fi>* |
| Francio | *S-ro J.Charles Trébouet* <br> *Ferme de Monchy, FR-60390 Auneuil* | *<trebouet.bohere@club-internet.fr>* |
| Irlando | *S-ino Joy Davies* <br> *9, Templeogue Wood, IE-Dublin 6W* | *<noviresp@eircom.net>* |
| Korea Resp. | *S-ro Cho Sung Ho* <br> *Biol.Fak.Inha Univ., KR Inchon 402-751* | *<shcho@inha.ac.kr>* |
| Norvegio | *Eldonejo Esperanto* <br> *Olaf Schous vei 18, NO-0572 Oslo* | *<hara-ryg@online.no>* |
| Pollando | *S-ino Magdalena Tatara* <br> *Košmice Wilkie 323, PL32-020 Wieliczka* | *<mtatara@gmail.com>* |
| Svedio | *S-ino Lisbeth Andréasson* <br> *Kajsa Kavats gata 8, SE - 24235 Hörby* | *<bertil.andreasson@horby.mail.telia.com>* |
| Usono | *Esperanto-USA* <br> *1335 Stanford Ave, Suite 300, Emeryville CA 94608, USA* | *<eusa@esperanto-usa.org>* |

***) Nepre informu pri via membrokotizpago laŭ b) (kun indiko de la kompleta poŝtadreso kien estu sendata Scienca Revuo) la novan ISAE-prezidanton:**
*Dr. José-Antonio VERGARA*
*Casilla 508, CL-Puerto Montt, Ĉilio*
<joseantonio.vergara@gmail.com>